# LAŬOKAZA NOVAĴLETERO

Organo de la
Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo

[Provizora sidejo ĉe:]
Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bühl 16,
FR Germanio

Numero 18 Novembro 1987

Estimataj gekolegoj!

Finfine atingis vin ĉi tiu Laŭokaza Novaĵletero. Ree mi iom prokrastis la aperon. Sed kvarfoje jare ŝajnas al mi pli konvena ritmo, adekvata al la vera aktivado de niaj membroj kaj al la malabunda alfluo de raportindaj informoj al la redaktoro.

La plej grava „novaĵo" estas la raporto pri la sukcesa Ĝenerala Kunveno kadre de la 72a Universala Kongreso en Varsovio. Estrarano F.-X. Gilbert verkis ĝin (vidu paĝon 3.). Ĉiuj proponoj prezentitaj en LN 16 estis aprobataj. Do, ni havas nun sepkapan, vere internacian estraron.

Plia grava okazaĵo staras antaŭ ni. Kadre de la 17a Vintra Esperanto-Ferio okazos la 2a Internacia Ekonomikista Simpozio je la 28/29 decembro 1987 en Budapeŝto, organizota de IKEF kaj detale aranĝota de niaj membroj de la Ekonomikista Fakgrupo de HEA (vidu paĝon 10.). Se vi ankoraŭ ne faris viajn planojn pri la tagoj inter Kristnasko kaj Novjaro, elektu vojaĝon al Budapeŝto! Se eblas por vi, faru prelegon en la simpozio! Kaj entute ĝuu la vintran ferion inter Esperanto-amikoj!

**via Franz Josef Braun**

## ...ernacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

**...straro:**
**S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario**
**S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto**
**D-ro István Gether**
**S-ro Francois-Xavier Gilbert**
**S-ro Lawrence Mee**
**D-ro Marco Picasso**
S-ro SeikôYamasaki,
**Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani**

**Centra sidejo (provizora):**
**Hornisgrindestr. 8**
**D-7580 Bühl 16 (FR Germanio)**

**Financa sidejo:**
**Visspaanstraat 97**
**B-8000 Brugge/Belgio**

ENHAVO

Paĝo 1 Enkondukantaj vortoj de la redaktoro
2 IKEF-estraro, enhavo de LN 18
3-5 Protokolo pri la Ĝenerala kunveno en Varsovio kun enmetitaj du
6 Pagoj – Perantoj – Kotizo, Interkonatiĝo
7-8 Identecŝildoj
9 IKEF – diversaĵoj
10-11 Ekonomia simpozio
12-13 Artikoloj pri ekonomiaj problemoj/decidoj en la EK
EME en EK kunlaboru transnacie
Lasta informo: Kompanio INTERLAND fondita Varbfolio de peranto Taleski (atentigo al..)
14 Varbfolio de Taleski malgrandigite fotita

**International Business Dictionary**
in nine languages

**Internacia komerca-ekonomika vortaro**
en naŭ lingvoj

Planned, compiled and edited by / Projektis, kompilis kaj redaktis | F. Munniksma

Under the auspices of / Sub aŭspicio de | Instituto por Esperanto en Komerco kaj Industrio (EKI) The Netherlands - Nederlando

KLUWER DEVENTER - ANTWERP 1975

# PROTOKOLO
# PRI LA ĜENERALA JARKUNVENO DE I.K.E.F.
# LUNDON
# la 27 an de Julio en VARSOVIO

- Sidas sur la podio
  - La Prezidanto F.J. BRAUN
  - la Estraranoj Dro I. GETHER
  - Sro F.X. GILBERT.

- En la salono ĉeestas 12 membroj
- Ricevis komision:
  - Sro DIMOVSKI de Sro TALESKI
  - Sro BRAUN de s-roj MEE kaj ROTSAERT

entute 18 voĉdonantoj kiuj subskribis la liston.

– oOo –

Laŭ la tagordo sendita al ĉiuj membroj inkluzivita en la n° 16 de la Laŭokaza Novaĵletero, la prezidanto prezentas:

1/ La agadraporton por la jaro 1986 (paĝoj 4 kaj 5) tiu-ĉi estas akceptata unanime


2 kaj 3/ La financan raporton por la jaro 1986; unanime la asembleo akceptas
- la spezokontojn kaj la bilancon
- la likvidon de la deficito per eluzo de parto de kapitalo
- la konservon de la sumo de la kotizo je 400 belgaj frankoj.

4A/ La elekton al la tri postenoj kiuj vakos:
Sinjoroj GETHER, GILBERT kaj MEE konsentas re-kanditatiĝi.
La prezidanto vokas aliaj kanditatojn: neniu prezentiĝas:
La baloto rezultigas:
GETHER – GILBERT = 17 voĉoj favore – 1 sindeteno.
MEE 18 voĉoj favore.


4B/ La ratifikon de la rolo de Sro ROTSAERT kiel financa konsilanto
Unanime la asembleo ratifikas.

4C/ La elekton de nova estrarano por kompletigi la estraron.
La presidanto proponas Sron Seikĉ YAMASAKI el Japanio kaj vokas aliajn kandidatojn; neniu prezentiĝas.
Sro YAMASAKI estas elektata pere de 17 voĉoj. Li mem sindetenas.

La estraranoj d-ro Gether, Gilbert, Braun
(de maldekstre) prezidante ...



...kaj parto de la ĉeestantaro aŭskultante





– oOo –

Post tiu administra parto de la kunveno, la prezidanto petas la ĉeestantojn (kiuj estas pli ol 60) prezenti rimarkojn pri la pasinta jaro kaj proponojn por la venonta jaro.

*Sro GETHER* parolas pri la hodiaŭa fondo de la internacia kooperativa esperanta organizo; ĝia agado estos certe tre utila al I.K.E.F. Li prezentas la novan hungaran revuon „Fokuso" kiu estas scienca populara eldanoĵo pri komputado kaj ekonomiko.

*Dro GOLDMAN* prezentas la ekonomia bultenon pri Usono.

*Sro BRAUN* parolas pri la reklamo en la revuo „Monato" kiu permesas eltiri monon por la kaso de I.K.E.F. Estas utila ilo por varbi kaj propagandi.

*Dro BORMANN* indikas ke I.K.E.F. ne estas sur la listo de T.E.C. kiel grupo interesata de la agado pri terminologia laboro. Sro BRAUN en la nomo de I.K.E.F. promesas sendi reprezantanton al T.E.C.

*Sro NIKOV* priparolas longtempe pri la interna ekonomia esperanta sistemo uzonta la monan unuon „Stelo". Li prezentas teorion surtabule: iu bazaro, iu esperanta banko ...kelkaj dolaroj kaj germanaj markoj.. pluraj personoj/rimarkigas ke la problemo de neŝanĝeblaj monoj estas grava barilo.

*Sro MAERTENS* klarigas ke U.E.A. funkcias kiel banko (2 000 personaj kontoj ĝi enhavas); li aldonas ke la intersanĝo de servoj (ekz: presaĵo) permesas eviti tiun barilon.

Fine li proponas la kreon de iu laborgrupo por studi la plibonigon de bankaj servoj de U.E.A. La prezidanto konsentas kaj decidas kunigi laborgrupon.

*Fino BOZOSKA* demandas ĉu estas komisiono de junaj studentoj pri ekonomio.

*Sro KÖNIG* respondas ke tia grupo funkcias kadre de A.I.S.E.C. ŝi sopiras al konkreta laboro!

Pri la eldono de traduklaboro, *Sro MAERTENS* atentigas pri la rajtoj de la aŭtoroj.

– oOo –

**Francois-Xavier Gilbert**

## INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

*Fakoj – Perantoj – Kotizo*

**Ĉiuj landoj**
Poŝĉekkonto belga (Bruselo): n-ro 000-1592629-83 kaj Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, Nederlando: „ikef-e" je nomo de: IKEF, p.a. R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge

**Perantoj**
*Britio*
S-ro P. Foss, Long House Hotel, Pilton, Som., BA4 4BP
*Francio*
S-ro F.X. Gilbert, Vert Coteau, Longeville-en-Barrois,
F-55000 Bar-le-Duc (CCP 1275-89 L Nancy)
*FR Germanio*
S-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, 7580 Bühl 16
(Volksbank Bühl 713104 – BLZ 66291400) Kotizo: 20 markoj
*Italio*
D-ro M. Picasso, via De Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro
*Jugoslavio*
S-ro S. Taleski, ul. ,Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje
*Hungario*
S-ro Jozsef Horvath, Budapest (Sekretario de Ekonomikista Grupo de HEA)
Varsányi Irén u.8.
H-1027 Budapest

*Togolando* (en LN 17 erare ellasita):
S-ro Koffi Gbeglo, B.P. 13169
Nyékonakpoé, Lomé

*Koreio*
S-ro Han Moo-hyup, CPO Kesto 5154, Seoul
ĉe *Novzelando* (adreso de s-ro Rypley ŝanĝiĝis)
S-ro John C. Rapley
P.O. Box 70-038, Ranui
Auckland 8,
Kotizo: 20 NZ-dolaroj

**Kotizo**

400 belgaj frankoj
20 nederlandaj guldenoj

**INTERKONATIĜO**
*a) Novaj membroj*
Ĉi-foje ni povas plezure bonvenigi kvar novajn membrojn:

61 S-ro V.R. Moore
P.O. Box 6615, Te Aro
Wellington, Nov-Zelando

62 D-ro Paolo Cerretini
Via S. Giusto 14
I-56100 Pisa, Italio

63 S-ro Robert Ebenau
Appelstraat 235
NL-4462 TK Goes, Nederlando

64 S-ino Maria Srogosz
str. Mieszczanska 3 m 18
PL-93322 Lodz, Pollando

Ili sendube aktive agados por la celoj de IKEF.

b) adresŝanĝoj

La nova adreso de s-ro Rapley, Auckland, Nov-Zelando, (IKEF 6) estas:
John C. Rapley
P.O. Box 70-038
Ranui
Auckland 8, Nov-Zelando

c) eksiĝintaj membroj

Bedaŭrinde s-ro Ing. José Gabriel Arocha, Caracas, Venezuelo, (IKEF 21) eksmembriĝis pro ŝanĝo de laboro kaj loĝloko kaj pro malsano. Ni deziras al li ĉion bonan por la estonteco.

d) DONACOJ AL NIA KASO
Faris donacojn al nia kaso:
S-ro Gregoire Maertens, Brugge (IKEF 29) 100 bfr,
S-ro Germain Pirlot, Oostende (ne membro) 250 bfr.

Multan dankon al ili.

e) Identecŝildoj:
14 Francois-Xavier GILBERT
Vert'Coteau
Longueville-en Barrois
F-55000 Bar-le-Duc

Direktoro de
Komerca kaj Industria Ĉambro
6, parc Bradfer
F-55000 Bar-le-Duc

Telefono: 29.79 30 60
Telekso: 961 302 F

Kapablas doni praktikajn informojn:
– pri francaj firmaoj,
– pri diversaj proceduroj de la internacia komerco,
– pri regionaj kaj nacia ekonomi

16 Shirin AHMAD-NIA
Kh.Zafar, Kh.Khojand,
K. Dolatshad, K.Iraj 33
Tehran 19-166/Irano

Okupo:
Studentino pri sociologio.
Instruistino pri Esperanto,
Verkado, raportado, kaj tra kado
Esperanto-persa kaj inverse,
Komitatano C de TEJO
UEA-fakdelegito (Intern. Ko pondado)

lingvaj eblecoj: persa, iom angla

eksportaj eblecoj: Libroj poezia kelklingvaj, iranaj;
vortaroj anglaj presitaj en iranc
iranaj metiartaĵoj.

Importaj deziroj:
Esperantaj libroj, terminologioj

Noto: Pro valuto-problemoj eblas
interŝanĝado de eksport- kaj portvaroj
supre indikitaj.

43 Seiko YAMASAKI
Higasi Koigakubo 3-18-12
Kokobunzi
Tky 185, Japanio

estrarano de kompanio por trejnado de oficistoj en la tereno de internacia komerco;

lingvaj eblecoj: angla, franca, germana

rilatoj: kun japana import- kaj eksportkompanio MITSUI & CO, LTD, kiu komercas tra propraj filioj en la tuta mondo.

47 Arthur SLY
200 Nevelle Road
Letchworth, Herts., SG6 4TZ
Britio

Okupo: Programisto ĉe North London Science Centre, (trejnado de instruistoj pri scienco),

Sekretario de la brita Esperantista Komputila Klubo (EKK), kiu klopodas, ke la ĝenerala komputo-movado agnosku Esperanton

Kapabloj: Studis komputo-sciencon; programadlingvoj, verkado kaj modifo de programoj.

51 József SZABÓ
Dr. Csanádi krt. 15-17, T/15
H-5000 Szolnok, Hungario

Okupo: Ŝtata oficisto, respondecas prifinancaj-teknikajkonstruajaferoj de stataj sanitaraj institucioj.

Lingvaj eblecoj: germana, rusa
Kompetenco: Esplorado de ekonomiaj-financaj manieroj en mastrumado de entreprenoj kaj institucioj.

Eksporto: Sanitaraj servoj de hungaraj sanitar-institucioj (Hospitaloj, klinikoj)
Importdeziroj: Kompense al sanitaraj servoj; sanitaraj instrumentoj
Rilatoj: Kun apotekistoj kaj sanitaraj institucioj
Speciala kapablo: financaj konsiloj, reviziado.

Tiuj IKEF-membroj, kiuj ĝis nun ankoraŭ ne prezentis sin per identicŝildo, bonvolu sendi viajn tiurilatajn informojn al s-ro Gilbert, Bar-le-Duc, por ke ni povu ilin aperigi en LN 19.



# IKEF – diversaĵoj

1) *Insigno por IKEF serĉata*

En LN 17, unua paĝo, ni alvokis desegnistojn/grafikistojn kaj aliajn tiurilatajn spertulojn inter ni, por ke ili skizu belan kaj simbolan insignon por IKEF. Alvenis kelkaj proponoj. Ni volas nun interne de la estraro pludiskuti la aferon, prijuĝi la proponojn kaj elekti iun inter ili kiel nian insignon.
Se vi havas ankoraŭ ideojn kaj proponojn, bonvolu sendi ilin al la redaktoro ĝis la 30a de novembro 1987.

2) *IKEF fariĝu „Kunlaboranta faka asocio" de UEA*

En la jarlibro 1987 de UEA estas unuafoje indikita IKEF kiel „faka acoio neligita al UEA" (vidu paĝon 86!).
Intertempe ni petis UEA, ke ĝi akceptu IKEF kiel „Kunlaboranta faka asocio de UEA". Estante tia asocio, IKEF inter alie ricevas senpage salonon por sia kunveno kadre de la Universalaj Kongresoj.

3) *Decido de la estraro: IKEF ne subtenu finance la Akademion de Esperanto!*


La estraro pridiskutis proponon de estrarano, ke IKEF fariĝu formale subtena instanco de la Akademio de Esperanto.
La fina rezulto estis malaprobo. Unu el la estraranoj kontraŭvoĉdonis kaj unu sindetenis. Laŭ la ĝisnuna estrara regularo, decidoj devas esti faritaj unuanime.

4) *Tri afrikaj IKEF-membroj en Varsovio*

Granda surprizo kaj ĝojo estis en nia Ĝenerala Kunveno en Varsovio pri la ĉeesto de ĝuste niaj tri afrikaj membroj, s-roj Mboge-Mbele el Kamerunio kaj Gbeglo kaj Agbemadon el Togolando. UEA estis invitinta ilin inter entute 13 afrikanojn al la jubilea kongreso, kvazaŭ kiel rekompenco pro ilia pionira Esperanto-agado en Afriko.
Ĉe tiu okazo ni atentigu al nia statuto, alineo 4.1.6, laŭ kiu ni subtenu agadojn „aparte por plibonigado de komercaj rilatoj inter la tiel nomata „Tria Monto! kaj la evoluintaj landoj". Se vi vidas iun eblecon en via ĉirkaŭaĵo aŭ ĉiutaga profesia laboro, agi en tiu direkto, vi enorme helpus la afrikanojn kaj per tio ankaŭ Esperanton. Bonvolu legi la identecŝildojn
18 Mboge-Mbele en LN 13 paĝo 6
41 Gbeglo en LN 15 paĝo 8
42 Agbemadon en LN 17 paĝo 7
por ekkoni la eblecojn.

5) *La „terminologia Ludo" finita*

Trifoje aperis ĝi en la lastaj Novaĵleteroj n-roj 15-17. Ĝi ne elvokis grandan intereson ĉe niaj legantoj. Tial mi ĉesas tedi vin per tio.




## BUDAPEST, HUNGARIO VETURU AL LA INTERNACIA EKONOMIKISTA SIMPOZIO DE IKEF

Ĝis nun ni ricevis nur kelkajn aliĝilojn kaj ege esperas, ke ĝis la fino de novembro alvenos ankoraŭ kelkaj. Ĉiuj membroj de IKEF ricevis varbilon kun informilo pro tio nun ni aldonas nur kelkajn informojn.

Estas decidite, ke el inter la eblaj lokoj ni okazigos la simpozion en la Universitato pri Ekonomiko (Budapest, IX. Dimitrov tér, ĉe ponto Szabadság, sur la Peŝta bordo).

Samtempe ni aranĝos malgrandan ekspozicion el la afiŝoj kaj varbilaj de tiuj entreprenoj, instancoj kiuj apogas mone nian simpozion.

Ene de la konferenca tempo ankoraŭ estas neokupita tempo por prelegonitoj. Ne nur la aliĝu sed ankaŭ prelegu!

Pri la eventoj de la simpozio detale sciigos LN 19 kaj FOKUSO. La plej interesaj prelegoj aperos en la 88-aj numeroj de FOKUSO.

VENU KAJ PRELEGU ANKAŬ VI!



# PROGRAMO

## de

## la 2-a INTERNACIA EKONOMISTA SIMPOZIO kaj

## 17-a VINTRA ESPERANTISTA FERIO BUDAPEŜTO 27. 12. 87. – 02. 01. 88.

| | |
|---|---|
| 27. 12. 87. dimanĉo | Alveno |
| 28. 12. 87. lundo | 10.00 Malfermo (Budapeŝta Universitato pri Ekonomiko)<br>10.15-12.15 Du ĉefaj prelegoj<br>12.15-13.30. Tagmanĝo<br>13.30-16. Prelegoj<br>Interkona vespero kun vespermanĝo<br>Ludas: duo „Fajrero". |
| 29. 12. 87. mardo | 8.30 Estrarkunsido de IKEF<br>10-12. Prelegoj<br>12-13.30 Tagmanĝo<br>13.30-16. Prelegoj<br>Internacia Kultura vespero<br>Láng Kulturdomo |
| 30.12. 87. merkredo | Tuttaga ekskurso:<br>I. provincen<br>II. en kooperativo<br>Vespere: konkurso „Kiu kion scias pri Esperanto?" |
| 31. 12. 87. ĵaŭdo | Vizito en Planedario<br>INTERNACIA SILVESTRA BALO<br>Ludas: ensemblo „Polarys" |
| 01. 01. 88 | Daŭrigo de la urborigardo,<br>Orgenkoncerto en Matias preĝejo,<br>adiaŭa vespero, kun vespermanĝo<br>Ludas: duo „Fajrero" |
| 02. 01. 88. | Forveturo. |

Manĝaĵo trifoje tage.

Unua servo: tagmanĝo la 28-an de decembro,

Lasta servo: matenmanĝo la 2-an de januaro.

Oni povas sendi la aliĝojn kaj al nia adreso, kaj al la adreso de Budapesta Komitato de HEA.

a. okcidentlandaj esperantistaj aliĝantoj estas petataj vojaĝante grupe aŭ individue alaĝi ĉe Esperanto Sekcio de Vojaĝoficejo Express, kaj laŭ sekvaj manieroj transpagi la partoprenkotizon:

1. per bankĉeko, – aŭ en dolaro aŭ en la egalvaloro de $-oj en via nacia valuto –, andresita al Vojaĝoficejo Express Budapeŝt. La ĉekon oni povas sendi rekte al la adreso de nia Esperanto Sekcio.
2. per transpago de partoprenkotizo tra ia via landa Banko – en via nacia valuto, an la egalvaloro de US$ kostoj-, al la konto nr-o 214-10648 de Vojaĝoficejo Express, Budapest, ĉe Hungara Nacia Banko.
3. Se vi volas pagi sorloke, ni petas la enpagon en US$-oj, aŭ en egalvaloro de $ kostoj en via nacia valuto.

4. Ĉe nia ambasadejo en via lando vi povas utiligi nian konfirmleteron pri la enpago, per kiu vi povas ricevi valutan liberecon. Sed tiun konfirmleteron ni povas nur tiam sendi al vi, se ni ricevis la enpagon. Pro tio estas preferinda antaŭpagi la restadon, kaj ne surloke pagi.

b. Jugoslavaj aliĝantoj povas grupe vojaĝi kaj pere de iu vojaĝoficejo transpagigi la dollaran partoprenkotizon, aŭ en dollaroj surloke pagi.

c. Aliĝantoj el socializmaj landoj estas akcepteblaj pere de siaj landaj esperanto turizmaj organizaĵoj. Esperantotur Bydgoszcz ul. M.Curie Sodowskiej 10/3 PL Internacia Esperanto Kursejo, Sofio str. Bodgora 40. B Esperanto Asocio de Slovakio. Popra nabr. Leninova 23. Ĉ Surlokan forintenpagon Budapesta Komitato se eblas evitas. Socialismaj landanoj rekte aliĝu ĉe Budapeŝta Komitato de HEA.

Aliĝdato kaj por grupoj kaj por individuoj: 30. 11. 1987.
Por la silvestra balo oni povas aliĝi ĝis 10. 12. 1987.
La Organizantoj elkore invitas la gastojn el ĉiu lando de la mondo.

*D-ro István Gether*
*organizanto*

*Margit Evva*
*sekciestrino*

Esperanto Sekcio de
Vojaĝoficejo EXPRESS
**Budapest V. Pf. 567**
**1395**
**Tel: 128-172**



*Esperantlingvaj artikoloj pri ekonomiaj problemoj/decidoj en la Eŭropa Komunumo (EK),*

Vi ja scias, ke la revuo MONATO estu iu de nia bazo por prezenti ekonomiajn temojn verkitajn de ni. Ni volas plenumi en „MONATO – Internacia magazino sendependa por politiko, *ekonomio* kaj kulturo" la tie preskaŭ vakan kampon ekonomio. Artikoloj pri ekonomiaj temoj estas tre bonvenaj ĉe la redakcio. Kaj kiel verkisto vi povas eĉ perlabori la abonon de MONATO.

Jam delonge mi pensas pri la ebleco, ke fakulo inter ni regule raportu pri ekonomiaj fenomenoj en la Eŭropa Komunumo (EK), kiu ja estas unu el la plej grandaj merkatoj de la mondo. En MONATO n-ro 3/87 aperis artikolo de mi: „Europa Komuno: Rimedoj kontraŭ senlaboreco". Temas pri resumo pri enketo farita de la EK inter entreprenistoj kaj dungitoj en la 12 landoj de la EK. Poste tiu artikolo fariĝis objekto de interesaj legantoleteroj en MONATO.

Mi sendis la revuon MONATO kun tiu artikolo kun traduko en la germanan lingvon al la „Komisiono de la Eŭropa Komunumo – Ĝenerala Direkcio Ekonomio kaj Financo", atentigante la Ĝeneralan Direktoron pri niaj klopodoj raporti esperantlingve pri ekonomiaj temoj en EK. De la asistanto de la Ĝenerala Direktoro, s-ro Nikolaus Adami, mi ricevis jenan leteroj (tradukita de mi el la germana en Esperanton):

**Bruselo, 1987-05-27**

*Estimata s-ro Braun!*

Multon dankon pro via letero de 30a de aprilo 1987 kaj pro la aldonitaj dokumentoj. Kun intereso mi legis la germanan tradukon de via artikolo, kiun vi skribis en la revuo „MONATO" pri nia enketo ĉe entreprenistoj kaj dungitoj.

De kunlaboranto de nia Ĝenerala Direkcio mi ricevis pliajn utilajn informojn pri la disvastigo de tiu magazino.

Tial mi volas ne nur danki al vi pro la plia disvastigo de la ekonomiaj analizoj kaj pripensadoj faritaj en nia fako, sed ankaŭ kuraĝigi vin, ke vi daŭrigu ĉe taŭgaj okazoj en la internacia lingvo Esperanto la disvastigon de rezultoj perlaboritaj de ni. Ĉe tio mi volas laŭeble praktike helpi vin; per aparta poŝtaĵo mi sendas al vi kelkajn el la lastaj publicaĵoj de nia.

Ĝenerala Direkcio „Ekonomio kaj Financo" (GD II); plie mi notigis vian adreson sur liston de distribuatoj, kio garantias aŭtomaton alsendon de nia publicaĵo „Eŭropa Ekonomio" kun aldonaĵoj al vi.

Per tio via Esperantista Internacia Fakgrupo por Komerco kaj Ekonomio (IKEF) regule ricevos bazajn informojn pri la diversaj kampoj de la ekonomio- kaj valuto-politiko el la vidpunkto de la Komisiono de la EK. Ĝojigus min aŭdi de tempo al tempo pri viaj tiurilataj aktivadoj.

kun afablaj salutoj
Nikolaus Adami
Asistanto de la
Ĝenerala Sekretario

Ĉu tio ne estas sekvinda invito? Ĉu per tia serioza laboro ni ne helpus por akceptigo de Esperanto ĉe „superaj instancoj" pli ol per multaj aliaj agadoj? Certe jes!

Sed *fari* ni devas ĝin. Tia artikolo ne de si mem eniras MONATOn. Verkisto devas resumi el multpaĝa kajero kaj traduki la esencon en Esperanton. Estas vere serioza agado en la senco de nia statuto. Kiu el niaj membroj el lando de la EK pretas helpi ĉe tio? Mi sole ne kapablas. Tio igas min al la ideo, ke membroj niaj el orientaziaj landoj (Japanio, Koreio) povus same raporti en MONATO pri ekonomiaj situacioj, problemoj, fenomenoj en sia regiono. Regiono kiu fariĝis pli kaj pli grava en la mondekonomio.

**Franz Josef Braun**

Lasta informo:

Kompanio INTERLAND fondita de s-ro Alexandre Rousset, 4, rue Monnaie, F 30400 Nilleneuve-les Avignon. Ĉi tiu firmao celas al trejnado de la internacia lingvo Esperanto al gvidantaj oficistoj de ne-anglalingvaj multnaciaj firmaoj. S-ro Rousset proponas al interesatoj, ke ili prenu kaj pagu parton de la kompania kapitalo. Ni pli detale informiĝos pri tiu firmao kaj raportos pri tio en la venonta LN.

Limdato por kontribuoj al NL 19:
20a de decembro 1987 ĉe la redaktoro

*Varbfolio de peranto*

Nia peranto en Jugoslavio, s-ro Taleski, partoprenis meze de junio 1987 la 22an Kongreson de la Jugoslavia Esperanto-Ligo. Por tio li preparis varbfolion pri IKEF, kiun li disdonis al kongresanoj. Sur la sekva paĝo vi vidas la folion. Forte sentebla estas la manko de unueca emblemo.



```
-----------------------------------------
I        K  K        EEEE          FFFF
I        K K         E             F
I        KK          EEE           FFF
I        K K         E             F
I        K  K        EEEE          F
=========================================
INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO
=========================================
```

La Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo havas la ĝeneralan celon disvastigi la uzadon de la internacia lingvo, Esperanto, kaj plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn inter la homoj en la kampoj de komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco.

IKEF povas atingi tiun ĉi celon per jenaj agadoj:
-instigi eksportantajn entreprenojn al uzado de la i.l. por instrukcioj kaj priskriboj sur pakaĵoj de varoj;
-labori por reeldono de la konata Internacia Komerca-Ekonomia Vortaro, en plivastigita formo rilate al la nombro de la lingvoj kaj pliampleksigita per novaj terminoj;
-malfermi rilatojn kun Komercaj ĉambroj, kaj por doni informojn pri la i.l.;
-subteni membrojn de IKEF por aranĝi negocojn inter si aŭ inter ĉiuspecaj organizaĵoj, uzante Esperanto;
-traduki en Esperanto jarfinajn raportojn de internaciaj entreprenoj kaj por montri taŭgecon de la i.l.:,
-instigi butikistojn kaj aliajn vendistojn al lernado de Esperanto (precipe en Kongresurboj) k.a.

Se Vi la leganto, estas komercisto, amatora aŭ profesia ekonomisto, profesoro aŭ studento, bonvolu kunlabori.

Ordinaraj membroj de IKEF povas esti:
-ĉiu individua persono kiu subtenas la celon kaj pretas akcepti ĉiujn devojn preskribitajn en la IKEF-statuto, kaj
-iu organizaĵo, kiu uzas aŭ pretas uzi la internacian lingvon, Esperanto, por komercaj rilatoj aŭ ekonomiaj interŝanĝoj, aŭ apogi tian uzadon.

Membreco aŭtomate implicias la devon pagi la jarkotizon. Jarkotizo estas 400 belgaj frankoj (aŭ 20 nederlandaj guldenoj). Membreco komenciĝas aŭtomate kiam aliĝilo kun taŭga kotizpago estas ricevita je la konto de la Oficiala IKEF-peranto.

IKEF bonvenigos vian aliĝilon kaj enskribos vin en sian membroliston kun aparta ĝojo.

Bonvolu peti informojn kaj aliĝilon,


| direktadreso de IKEF | Oficiala Jugoslavia IKEF-peranto |
|---|---|
| IKEF<br>Hornisgrinderstrasse 8,<br>7580 Bühl 16<br>FR Germanio | s-ro Sotir Taleski<br>ul "OSLO" br.12<br>91000 Skopje<br>Jugoslavio |

*Anonco:*

Nia membro, s-ro Lawrence Mee, 19 Cranbury Road, Eastleigh, SO5 5 HB, Britio, havas troan ekzempleron novstatan de „Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj" de F. Munniksma, Kluwer eldonejo 1974. Li ofertas ĝin je la prezo de 35 britaj pundoj. Se vi interesiĝas, bonvolu skribi al li.

***Ĝenerala Kooperativeto***

**Laŭ komisio**

- **helpas en la vendo de vigi produktaĵoj**
- **organizas produkto – vendo kontaktoj**
- **esploros le merkaton**
- **argening pruntedonon de produktiloj**
- **teknikan evoluigan entreprenas**

**en Hungario en multaj terenoj**

**ÁLTALÁNOS IPARI SZOLGÁLTATÓ SZERVEZŐ KISSZÖVETKEZET**

H-6401 KISKUNHALAS
pf. 127.
Telekso: 26 696

---

*AL INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO (IKEF)*

Financa sidejo:
S-ro Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97
B 8000 Brugge/Belgio

## ALIĜILO

Per tio ĉi mi/ni petas aliĝon al la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), kiel individua persono /entrepreno/ alia instanco. Mi/ni deklaras la intencon subteni la statuton de IKEF kaj finance kontribui al la mastrumado de la fakgrupo.

Nomo, sub kiu la membreco estiĝu: ....................................................................................
Plena poŝtadreso..........................................................................................................
S-ro/S-ino/F-ino...................................... Jaro de naskiĝo/fondiĝo....................................
Profesia okupo kaj agadkampo (j)...................................................................................
Maniero de kotizpago ....................................................................................................
Aliaj rimarkoj..................................................................................................................
Loko/dato...........................................Subskribo.............................